Liberacana Barikado
Konstrui Detrui
ANARKIO KAJ ESPERANTO
ANARKIO
INFORMA MONATA BULTENO
JUNIO 2012
Nº 22

Anarkiistaj Principoj

La procezo de revolucia organizo disvolvas super generacioj, ke kelkfoje eĉ havas komenci preskaŭ de nulo.

En multaj kazoj estas la puno aŭ eĉ profunda diverĝoj nesolvitaj en liberecana formo, kondukas al malfondo kaj forigo de grupoj de individuoj de anarkiismo. Ĉi nur kondukas al la neceso kaj konvinko ne akcepti la staton de ekspluatado kaj subpremado, nek submeti por regatajn grupojn de dekstra aŭ maldekstra, centralismaj kaj obeigemaj grupoj.

Ni asertas nia principoj estas luktajn kompromisojn kun nia klaso, premataj kaj ekspluatataj. Ni devenas de ĉi tiuj grupoj kaj ni suferas tiel mizero kaj ni indignigitaj de ĉi tiu situacio, ni organiziĝas por socia alfrontanto, kie ni ne forlasas anarkiismon nek ĝiaj principoj ke definas ĝin.

La lukto por emancipiĝo estas la laboro de ĉiuj, ni unuiĝu!



I- Popola Lukto:

La popola lukto okazas en la procezo de rezisto por haltas kaj finas la ekspluatado de privilegiitajn grupojn, la popolo kiel politika forto.

II-Reciproka Subteno:

La unio de malsamaj individuoj kunigi fortojn kaj eblecojn de ago, unu apogas la alian, fortigante la socia rilato.

III-Revolucia Solidareco:

Tiu okazas meze de devontigo al anarkiismo, kun ĝiaj principoj kaj konvinko de libereco por ĉiuj sen escepto.

IV- Rekta Ago:

Signifas la konstanta reago de la subprematojn kontraŭ la aktuala ordo, kreanta proprajn rimedojn por agado.

V- Multoblaj agadoj:

Anarkiismo povas esti aplikita en malsamaj agoj, estas singulara koncepton de aplikanta pluralo, sen ekspluati nek premu.

VI- Kontraŭ-aŭtoritatismo:

Abolicii la aŭtoritato kiel domajno aŭtoritato kaj ne kiel distinga kompetenteco ene de socio.

VII- batalema klasismo:

La emancipiĝo procezo estas forigi sociajn klasojn tial ne ekzisti malsamaj povoj.

VIII- Aŭto-administrado:

Administrado kie tiuj implikitaj estas ambaŭ perantoj kaj partoprenantoj de la aktivecoj disvolvis kaj konsentis kune.

IX- Rekta Demokratio:

Demokratio estas farita kun la homoj rekte, sen perantoj. Tiel, elektoj estas insulto al emancipado de nia popolo.

X- Popola Povo:

La organizitaj homoj generas la povon por decidi kaj fari kion taŭga , reprenanto la potenco kiu estis ŝtelitajn per instituciojn de kontrolon.

XI- Federaciismo:

Tion respektas la karakterizaĵoj de ĉiu regiono, organizoj kaj individuoj. Ĉiam gardante la aŭtonomecon de siaj membroj, disvolvas la unio de agoj, alportante kohera korpo de ago kaj lukto por ĉiuj.

XII- Sennaciismo:

La lukto ne reduktiĝas al unu loko, sed en ĉiuj lokoj ĉirkaŭ la mondo, ĉar la ekspluatataj kaj subpremataj klasoj ne resumas en unu lando sed estas en tuta mondo kaj nure per ĝia kuniĝo kun rekta emancipiĝa propono tion vere okazos.

Manifesto de la Sennaciistoj

Daŭrigon

Kelkiuj, kiel ekz. Krupskaja, la vidvino de Lenin, antaŭ nelonge faris paroladon pri nacia k internacia kulturo, k en tiu parolado ŝi atakis sennaciismon, pledante por nacikulturoj. Estas rimarkinde, ke si ligis sennaciismon kun esperanto k direktis siajn atakojn samtempe kontraŭ tiu k alia. – Frapanta ekzemplo de l' praktika nacipolitiko: La Ĥarkova radiostacio organizis disaŭdigon de priesp-aj lekcioj k esp. kurso en ukraina lingvo. Tio ne plaĉis al kelkaj ukrainaj naciistoj, kiuj gvidas la stacion, ĉar ili ja celas ukrainigon, ne esperantigon. Oni serĉis pretekston por forigi la nedezirindan lekciaron. Kaj jen tian pretekston oni trovis: la K-do lekciisto diris en iu el siaj lekcioj, ke venos tempo, kiam – sur la grundo de tutmonda ekonomio – formigos tutmonda kulturo k – iom post iom – formortos naciaj lingvoj. Nu, tio estis sufiĉa: la sekvonta lekcio ne okazis ! . . . » (2-XII-1927.)

Ni tamen ne diras, ke la politika agitado estas tute nenecesa, senutila. Sed ĝi ne estas sufiĉa. La plej esence grava estas la laboro de la pioniroj, kiuj inventas, anticipas, dishakas en la arbaro el antaŭjuĝoj k tradicioj, forsekigas la marĉon el rutinoj k tiel preparas la vojon, kiun pli poste sekvos la amaso.

II. Sennaciismo

Kio aliigas fakte la mondon, tio estas la scienco, la tekniko, – idoj de la Racio, kiu produktas artefaritaĵojn. Ĝi inventas, konstruas, aliigas la laborkondiĉojn de l'homoj, eĉ la medion, en kiu ili vivas, per aplikado de novaj produktofortoj. Tiuj aliigoj reefikas sur la spiriton de l' homoj. La scienco ne povas esti nacieca kiel la arto. La racio estas la sama ĉe ĉiuj latitudoj. Du plus du estas kvar en Londono kiel en Pekino. Por konstrui maŝinon, oni devas fari la samajn kalkulojn, indiferente ĉu tio okazas en Moskvo aŭ en Nov-Jorko. Ni tiel kvazaŭ palpas per la fingroj la bazon, sur kiu povas stariĝi tutmonda kulturo.

Aliparte, metallaboristo produktanta la saman parton el aŭtomobilo, ĉu en Parizo, ĉu en Tokio, estas devigata fari la samajn manipulojn k tiel estas metata en saman artefaritan medion. Tiu fakto kreas la necesan – sed ne sufiĉan – kondiĉon por ke unuformiĝu la spirito de ĉiuj metallaboristoj en la mondo.

Malhelpas al tio plurjarcenta peza tradicio, malsamaj lingvoj k malsama edukado.

Tiuj laboristoj estas ankaŭ plej ofte ekspluatataj de la sama mastro: la financa kapitalo, kiun per la akcia sistemo konsistigas la puntoj de monhavantoj el ĉiuj mondpartoj. En la borsoj de l' grandurboj iu ajn monhavanto povas ja aĉeti la laborforton de homoj, kiujn li ne konas, kiujn li neniam vidos, pri kies ekzisto li eĉ ne pensas. Kaj se okazas bankroto de gravaj bankoj en Nov-Jorko, tiu reefikas sur ekonomian vivon en Tokio k en Berlino. Neniu neas tion.

Daŭrigas en proksima numeron.

Ni rekomendas

Interetaj interesaj paĝoj

Radio Verda Starigite en 1998, Radio Verda estas pionira sendependa produktejo de interreta aŭda programaro disponata senpage per TTT.
http://radioverda.com/

Liberecana Frakcio konsistas el SAT membroj, de la sama politika filozofio aŭ tendenco kiuj sin prezentas kiel anarkiistoj, liberecanoj, anarki-sindikatistoj, anarki-komunistoj, ktp.
http://www.satesperanto.org/-Liberecana-Frakcio-.html

S.L.E.A. propagandas por Esperanto ene de la maldekstra movado kaj inter aliaj progresemaj homoj.
http://www.slea.se/sleaesperanto.html

El liberacana vidpunkto estas eldonas por Kultura Societo Interhelpo
http://www.enxarxa.com/esperanto/ELV/

Informabulteno Blogo
http://informabulteno.wordpress.com/

Vi ankaŭ sendu viajn rekomendojn! Kontakton: barriliber@anarkio.net

Ni Nula Balotu

Por alia Politiko!



aŭtonomia organizacio sen partiojn, sen mastrojn, sen ŝtaton!

Ni ankoraŭ bezonas voluntulojn!



Nia iniciatemo bezonas voluntulojn por skribi, traduki, desegni aŭ por iu ajn kontribuaĵo.
Ĉia helpo estas bonvenan, dankon!
Sanon kaj anarkion!

Kontaktojn
Liberacana Barikado
CP: 5005 - 130036-970 Campinaso - San-Paŭlio
m.e.: barriliber@anarkio.net lobo@riseup m.e.: fenikso@riseup.net
http://anarkio.net